

Leterkesto 2.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.10.17 - 19

CL.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. La pasintan semajnon ni konkludis nian leterkestan elsendon salutante CHAN Sook Wai (ĈAN Sukŭaj) en Kuala Lumpur, Malajzio, kiu laboras por Malajzia Esperanto-Asocio fondita en majo 1989. Ĉar li sendis interesan mesaĝon, kiun ni deziris grandparte citi, ni komencas tiun ĉi duan leterkestan elsendon resalutante lin.

A.- Ĉan Sukŭaj konscias, ke la lingva kvalito de la organo, kiun ili publikigas sub la titolo "Esperantistoj, Kualalumpo, Malajzio", estas ne bona. Tial ili atendas helpon sub la formo de libroj, leteroj, proponoj, kritikoj, ktp. Ili deziras plibonigi sian lingvonivelon kaj ankaŭ interŝanĝi informojn. En Malajzio ili ne povas aĉeti aŭ trovi esperanto-lernolibrojn, nek literaturajn verkojn. Ni esperas, ke inter nia aŭdantaro kelkaj personoj estos pretaj sendi al tiu tute nova esperanto-organizaĵo librojn aŭ revu-numerojn, kiujn ili ne plu uzas. Ili skribu al ni tra la kanalo de Svisa Radio Internacia, kaj ni donos al ili la adreson de CHAN Soek Wai (ĈAN Sukŭaj) en Kuala Lumpur. El ilia organo menciita ni citos hodiaŭ artikolon titolitan: "Labortago en Kualalumpo":

CL.- "En okcidento oni laboras dum kvin tagoj en la semajno. En Kualalumpo, Malajzio, oni kutime laboras dum kvin kaj duona tagoj en la semajno. Se iu laboras en internacia kompanio, li laboras dum kvin tagoj.

A.- "Laŭ la ŝtata regulo oni laboras dum 44 horoj en la semajno. Se oni laboras dum 5 tagoj kaj duono, tio signifas, ke la laborhoroj estas de la 09.00 ĝis la 17.00 en lundo ĝis vendredo kaj de la 09.00 ĝis la 13.00 en sabato.

CL.- Rring! Oni vekiĝas frue matene por prepari sin por la laboro. Oni matenmanĝas hejme aŭ en laborejo. Poste, oni veturas al sia laborejo per aŭto aŭ buso. Pro la nebona publika transportsistemo oni preferas veturi per propra aŭto anstataŭ per buso. Tio kaŭzas trafikŝtopiĝon sur ĉiu strato en la urbo - ĉu al aŭ el la urbo. Kualalumpo estas ne planita urbo, ĝi simple kreskis ĝis tia tempo kiam oni ne povas pensi pri pli bona solvo. Oni planis konstrui amaŝtransportan sistemon, sed ĉiam prokrastas pro la kosto.

A.- La laborejo estas klimatizita kaj oni laboras en bone aer-kondiĉita ejo. Estas modernaj ekipaĵoj por faciligi la laboron.

CL.- Oni tagmanĝas de la 13.00 ĝis la 14.00 kaj kutime oni eliras el la laborejo al iu manĝejo proksima por manĝi.

A.- Je la 17.00 oni preparas sin por reveni hejmen post la laboro."

CL.-Post tiu rehejmiĝo Ĉan Sukŭaj verŝajne okupikĝas pri Esperanto. Ni esperas, ke aŭskultantoj deziros kontakti kun li. Kiel ni jam diris, ni volonte donos lian adreson al tiuj, kiuj ĝin petos skribante al Svisa Radio Internacia. Kiel vi konstatis, tiu labortago de Kualalumpuranoj tre similas al tiu de multaj aliaj urbanoj. Labore la mondo unueciĝas. Ankaŭ la urbaj problemoj estas la samaj. Nur kune ni povos ilin solvi.

A.- Kaj nun ni rigardu al aliaj kontinentoj salutante Lew COOK en Circleville, Usono, Gérard COULON en Buanes, Francio, membro de Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj.

Faco DAVILA skribis el La Laguna, Tenerife, Kanariaj insuloj: "Saluton el Kanarioj okaze de Hispana Kongreso. Rigardu la stampon."

CL- Fakte la koverta estas stampita honore al la kongreso. Ĝin ni transsendas al la esperanto-arkivejo CDELI en La Chaux-de-Fonds. Saluton al Frangoise DONNE en Douai, Francio, al Jacques DONY en La Ricamarie, Francio, pro 2 mesaĝoj. Li instruas Esperanton al infanoj kaj bedaŭras, ke neniuj radio-elsendoj konvenas al tiu ĉi publiko. Li diras sian intereson por la intervjuo, kiun ni havis kun la bulgarino Kremona Braceva pri la premado fare de la komunismo. Multajn aŭskultantojn interesis tiu elsendo.

A.- Saluton al Jacques DUCROCQ en Calais, Francio. Koncerne niajn elsendojn pri la naskiĝo de la svisa federacio kaj pri la rolo de Napoleono li skribis: "La sinteno de Bonaparte koncerne vian landon igas min ankoraŭ pli malestimi lin!"

CL- Dankon al Zoltán DUKAI en Zagreb, Jugoslavio, kiu sendis 2 mesaĝojn, al A. ENGELMANN en Wien, Aŭstrio, kiu sendis poŝtkarton pri la Viena Zamenhof-Monumento en la parko malantaŭ la borso. Ĝin ni transsendas al CDELI.

A.- Saluton al Ireneusz FIEDOROWICZ en Goldap, Pollando, al Manfred HANSCHKE en Berlin, Germanio, kiu sendis du mesaĝojn. Li skribis: "Hodiaŭ mi aŭskultis vian elsendon, kaj povis interalie aŭdi, ke mia longjara ĉeĥa leteramikino Sonja Zednikova rakontis al vi, ke nun ŝi posedas novan radioricevilon, kiun ŝi ricevis donace de sia filo." Manfred HANSCHKE konkludas rakontante, ke estas li, kiu instigis ŝin aŭskulti la elsendojn de Svisa Radio Internacia. Li estas kontenta "nun ekscii, ke ŝi povas aŭskulti niajn elsendojn. Elkorajn salutojn li peronde sendas al ŝi pere de niaj ondoj. Espereble Sonja Zednikova nin aŭdis.

CL- Saluton al Jaromir HAUZAR en Frankfurt, Germanio, al Rudolf HELMKE en Mohnesee-Günne, Germanio, al Jirina kaj Vilmer JONASSON en Johanneshov, Svedio, al Otto KACZINSKI en Havelberg, Germanio, al Sakari KAUPPINEN en Vantaa, Finnlando.

A.- Karlheinz KERSTING en Essen, Germanio, sendis 2 mesaĝojn. Pri vojaĝo al Rutli li skribis humure: "Nun mi rememoras kiel mi kune kun mia edzino antaŭ 10 jaroj vizitis la svisan nacian memorlokon Rütli apud lago de la Kvar Kantonoj. Samtempe ĉeestis tie iu svisa instruisto kune kun siaj lernantoj. La lernantoj sidis ĉirkaŭ la flagostango kaj la instruisto prelegis pri la svisa historio. Dume la infanoj - cetere kiel ĉiuj infanoj de la mondo - ne havis intereson por la seka historio; ili prefere rigardis la belan ĉirkaŭaĵon. Mi kredas, ke nur mia edzino kaj mi aŭskultis kaj per tio ni ricevis senkoston lecionon pri la svisa prahistorio. Bonŝance, ke la instruisto parolis altgermane - la svisgermanan ni komprenas parte. Poste ni veturis kune kun la petola aro sur la ŝipo." Karlheinz KERSTING konkludas sian leteron per la demando: "Cetere hodiaŭ vi parolis pri iu nova revuo el Pollando. Mi havas intereson. Kiamaniere mi povas kontakti kun la eldonanto."

CL- La titolo de tiu revuo estas "La Epoko". Ĝin eidonas Tomasz CHMIELIK. Skribe mi sendas la koncernan adreson de tiu revuo dediĉita al kulturaj, politikaj kaj esperantaj temoj al ĉiuj aŭskultantoj, kiuj esprimis la deziron ĝin ricevi

A.- Walter KLAG en Wien, Aŭstrio, sendis po duekzemplere siajn eldonaĵojn aperantajn en la kolekto Verda Serio. 'Wels, urbo en Supera Aŭstrio', kiun verkis lia patro estas urbopriskribo. 'Hospitalo sepetaĝa' rakontas pri la flegado en stranga hospitalo, kie la pacientojn oni loĝigas laŭ la graveco de iliaj malsanoj, tute supre la bonfartuloj, ju pli malsupre, des pli mortproksimaj. Li sendis al ni interesan intervjuon kun sinjorino Katalin SMIDELIUSZ,

esperanto-instruistino en Hungario. La venontan semajnon ni laŭtleĝos ĝin al vi resalutante Walter KLAG.

CL- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND rediras dankon al ĉiuj skribintoj: Ĝis reaŭdol

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), junio 2012*